Sankta Meso, Ĉieleniro de la Sinjoro

ĵaudon, 17an de majo 2007a

Enira kanto: Adoru 343

Kyrie-Alvoko: Adoru 041

Gloro-himno: Adoru 042

Resuma preĝo

Ĉiopova Dio, ĉieleniro de via Filo estas honorigo de la homa naturo. Faru, por ke ni en sankta ĝojo celebru al Vi la dankoferon, kaj fortikigu nian esperon ligiĝi en la mistika korpo de Kristo. Per nia Sinjoro Jesuo Kristo, via Filo, kiu vivas kaj regas kun Vi en unueco kun la Sankta Spirito, Dio en ĉiuj jarcentoj.

Unua legaĵo - Ago 1, 1-11 (Komenco de la Agoj de la Apostoloj)

La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio, kion Jesuo komencis fari kaj instrui, ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren, doninte ordonon per la Sankta Spirito al la apostoloj, kiujn li elektis; al kiuj ankaŭ post sia suferado li montris sin vivanta per multaj pruvoj, dum kvardek tagoj aperante al ili kaj parolante pri la aferoj de la regno de Dio; kaj kunestante, li admonis ilin ne foriri el Jerusalem, sed atendi tiun promeson de la Patro, pri kiu (li diris) vi aŭdis de mi; ĉar kiel Johano baptis per akvo, vi baptiĝos per la Sankta Spirito post ne multe da tagoj. Ili do, kunveninte, demandis lin, dirante: Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Izrael? Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia aŭtoritato. Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalem kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero. Kaj tion dirinte, li suprenleviĝis, ankoraŭ dum ili rigardis, kaj nubo ricevis lin for de iliaj okuloj. Kaj dum ili fikse rigardis al la ĉielo, kiam li foriris, jen staris apud ili du viroj blanke vestitaj; kiuj ankaŭ diris: Viroj Galileanoj, kial vi staras rigardantaj al la ĉielo? ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon.

Responsoria Psalmo (Psa 47, 2-10)

Dio supreniras ĉe ĝojkriado,
La Sinjoro ĉe trumpetado

Ĉiuj popoloj, plaŭdu per la manoj,
Kriu al Dio per voĉo de kanto.
Ĉar la Eternulo Plejalta estas timinda;
Li estas granda Reĝo super la tuta tero.

Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo,
La Eternulo ĉe trumpetado.
Kantu al Dio, kantu!
Kantu al nia Reĝo, kantu!

Ĉar Dio estas la Reĝo de la tuta tero:
Kantu edifan kanton!
Dio reĝas super la popoloj;
Dio sidas sur Sia sankta trono.

Dua legaĵo - Heb 9, 24-28. 10, 19-231 (el La letero al la Hebreoj)

Kristo eniris ne en sanktejon manfaritan, ekzemplon de la vera; sed en la ĉielon mem, por aperi antaŭ la vizaĝo de Dio por ni; nek estas necese, ke li oferu sin ofte, kiel la ĉefpastro eniras en la sanktejon jaron post jaro, kun sango ne propra; alie li devus ofte suferi de post la fondo de la mondo; sed nun unufoje en la fino de la mondaĝoj li aperis, por forigi la pekon per la ofero de si mem. Kaj kiel estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo; tiel ankaŭ Kristo, oferite unufoje, por porti la pekojn de multaj, aperos duan fojon, aparte de peko, al tiuj, kiuj lin atendas, por savo. Havante do, fratoj, kuraĝon eniri en la plejsanktejon per la sango de Jesuo, per la vojo nova kaj vivanta, kiun li dediĉis por ni, tra la kurteno, tio estas, lia karno, kaj havante grandan pastron super la domo de Dio, ni alproksimiĝu kun sincera koro, en pleneco de fido, kun niaj koroj aspergitaj for de malbona konscienco, kaj kun la korpoj lavitaj per akvo pura; ni tenu firme la konfeson de nia espero sendekliniĝe; ĉar la promesinto estas fidela.

Sankta Meso, Ĉieleniro de la Sinjoro

ĵaudon, 17an de majo 2007a

Enira kanto: Adoru 343

Kyrie-Alvoko: Adoru 041

Gloro-himno: Adoru 042

Resuma preĝo

Ĉiopova Dio, ĉieleniro de via Filo estas honorigo de la homa naturo. Faru, por ke ni en sankta ĝojo celebru al Vi la dankoferon, kaj fortikigu nian esperon ligiĝi en la mistika korpo de Kristo. Per nia Sinjoro Jesuo Kristo, via Filo, kiu vivas kaj regas kun Vi en unueco kun la Sankta Spirito, Dio en ĉiuj jarcentoj.

Unua legaĵo - Ago 1, 1-11 (Komenco de la Agoj de la Apostoloj)

La unuan historion mi faris, ho Teofilo, pri ĉio, kion Jesuo komencis fari kaj instrui, ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren, doninte ordonon per la Sankta Spirito al la apostoloj, kiujn li elektis; al kiuj ankaŭ post sia suferado li montris sin vivanta per multaj pruvoj, dum kvardek tagoj aperante al ili kaj parolante pri la aferoj de la regno de Dio; kaj kunestante, li admonis ilin ne foriri el Jerusalem, sed atendi tiun promeson de la Patro, pri kiu (li diris) vi aŭdis de mi; ĉar kiel Johano baptis per akvo, vi baptiĝos per la Sankta Spirito post ne multe da tagoj. Ili do, kunveninte, demandis lin, dirante: Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Izrael? Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia aŭtoritato. Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalem kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero. Kaj tion dirinte, li suprenleviĝis, ankoraŭ dum ili rigardis, kaj nubo ricevis lin for de iliaj okuloj. Kaj dum ili fikse rigardis al la ĉielo, kiam li foriris, jen staris apud ili du viroj blanke vestitaj; kiuj ankaŭ diris: Viroj Galileanoj, kial vi staras rigardantaj al la ĉielo? ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon.

Responsoria Psalmo (Psa 47, 2-10)

Dio supreniras ĉe ĝojkriado,
La Sinjoro ĉe trumpetado

Ĉiuj popoloj, plaŭdu per la manoj,
Kriu al Dio per voĉo de kanto.
Ĉar la Eternulo Plejalta estas timinda;
Li estas granda Reĝo super la tuta tero.

Dio supreniras ĉe sonoj de ĝojo,
La Eternulo ĉe trumpetado.
Kantu al Dio, kantu!
Kantu al nia Reĝo, kantu!

Ĉar Dio estas la Reĝo de la tuta tero:
Kantu edifan kanton!
Dio reĝas super la popoloj;
Dio sidas sur Sia sankta trono.

Dua legaĵo - Heb 9, 24-28. 10, 19-231 (el La letero al la Hebreoj)

Kristo eniris ne en sanktejon manfaritan, ekzemplon de la vera; sed en la ĉielon mem, por aperi antaŭ la vizaĝo de Dio por ni; nek estas necese, ke li oferu sin ofte, kiel la ĉefpastro eniras en la sanktejon jaron post jaro, kun sango ne propra; alie li devus ofte suferi de post la fondo de la mondo; sed nun unufoje en la fino de la mondaĝoj li aperis, por forigi la pekon per la ofero de si mem. Kaj kiel estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo; tiel ankaŭ Kristo, oferite unufoje, por porti la pekojn de multaj, aperos duan fojon, aparte de peko, al tiuj, kiuj lin atendas, por savo. Havante do, fratoj, kuraĝon eniri en la plejsanktejon per la sango de Jesuo, per la vojo nova kaj vivanta, kiun li dediĉis por ni, tra la kurteno, tio estas, lia karno, kaj havante grandan pastron super la domo de Dio, ni alproksimiĝu kun sincera koro, en pleneco de fido, kun niaj koroj aspergitaj for de malbona konscienco, kaj kun la korpoj lavitaj per akvo pura; ni tenu firme la konfeson de nia espero sendekliniĝe; ĉar la promesinto estas fidela.

Haleluja. Haleluja. La Sinjoro supreniras ĉe sonoj de ĝojo, li supreniras en la altojn (laŭ Joh 16, 28) **Haleluja**.

Evangelio - Luk 24, 46-53 (el la Evangelio laŭ sankta Luko)

Jesuo resurektinta, diris al siaj disĉiploj: Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi, kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon; kaj ke pento kaj pardonado de pekoj estu predikataj en lia nomo al ĉiuj nacioj, komencante ĉe Jerusalem. Vi estas atestantoj pri tio. Kaj jen mi elsendos sur vin la promeson de mia Patro; sed restu en la urbo, ĝis vi vestiĝos per potenco de supre. Kaj li elkondukis ilin ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis ilin. Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis suprenportita en la ĉielon. Kaj adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalem kun granda ĝojo; kaj estis konstante en la templo, glorante Dion.

Ofera preĝo

Humile ni prezentas al vi, Sinjoro, laŭdoferon pro la mirinda ĉieleniro de via Filo. Konsentu, ni petas, ke per ĉi tiu interŝanĝo de donacoj, ni leviĝu al la ĉiela ĝojo. Per Kristo nia Sinjoro.

Prefacio

C La Sinjoro estu kun vi.
K Kaj kun via spirito.

C Leviĝu viaj koroj.
K Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.

C Ni danku al la Sinjoro, nia Dio.
K Estas inde kaj juste.

C Vere estas inde kaj juste, ĝuste kaj save,
ke ni ĉiam kaj ĉie danku al Vi, Sinjoro, Patro Sankta, ĉiopova eterna Dio, per Kristo, nia Sinjoro.
Li post sia reviviĝo aperadis al siaj disĉiploj, kaj adiaŭinte ilin, leviĝis al la ĉielo, por doni al ni partoprenon en sia dieco. Pro tio, per pleneco de la paskaj gracoj, ĝojas ĉiuj nacioj sur la tero.
Ankaŭ la anĝeloj kaj ĉiuj sanktuloj kantas himnon al via gloro:

CK Sankta, sankta, sankta estas la Sinjoro, Dio de legiaroj.
Plenas de via gloro la ĉielo kaj la tero.
Hosana en la altoj!
Benata, kiu venas en la nomo de la Sinjoro.
Hosana en la altoj!

Komunia antifono - Mat 28, 20

Jen Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo. Haleluja.

Postkomunia preĝo

Ĉiopova eterna Dio, Vi permesis al ni jam sur la tero gustumi viajn donojn. Veku en ni deziron de la ĉielo, kie kun Vi estas Kristo en la homa korpo. Per Kristo nia Sinjoro.

Haleluja. Haleluja. La Sinjoro supreniras ĉe sonoj de ĝojo, li supreniras en la altojn (laŭ Joh 16, 28) **Haleluja**.

Evangelio - Luk 24, 46-53 (el la Evangelio laŭ sankta Luko)

Jesuo resurektinta, diris al siaj disĉiploj: Tiel estas skribite, ke la Kristo devas suferi, kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon; kaj ke pento kaj pardonado de pekoj estu predikataj en lia nomo al ĉiuj nacioj, komencante ĉe Jerusalem. Vi estas atestantoj pri tio. Kaj jen mi elsendos sur vin la promeson de mia Patro; sed restu en la urbo, ĝis vi vestiĝos per potenco de supre. Kaj li elkondukis ilin ĝis apud Betania, kaj, levinte siajn manojn, li benis ilin. Kaj dum li benis ilin, li foriĝis de ili kaj estis suprenportita en la ĉielon. Kaj adorkliniĝinte al li, ili revenis al Jerusalem kun granda ĝojo; kaj estis konstante en la templo, glorante Dion.

Ofera preĝo

Humile ni prezentas al vi, Sinjoro, laŭdoferon pro la mirinda ĉieleniro de via Filo. Konsentu, ni petas, ke per ĉi tiu interŝanĝo de donacoj, ni leviĝu al la ĉiela ĝojo. Per Kristo nia Sinjoro.

Prefacio

C La Sinjoro estu kun vi.
K Kaj kun via spirito.

C Leviĝu viaj koroj.
K Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.

C Ni danku al la Sinjoro, nia Dio.
K Estas inde kaj juste.

C Vere estas inde kaj juste, ĝuste kaj save,
ke ni ĉiam kaj ĉie danku al Vi, Sinjoro, Patro Sankta, ĉiopova eterna Dio, per Kristo, nia Sinjoro.
Li post sia reviviĝo aperadis al siaj disĉiploj, kaj adiaŭinte ilin, leviĝis al la ĉielo, por doni al ni partoprenon en sia dieco. Pro tio, per pleneco de la paskaj gracoj, ĝojas ĉiuj nacioj sur la tero.
Ankaŭ la anĝeloj kaj ĉiuj sanktuloj kantas himnon al via gloro:

CK Sankta, sankta, sankta estas la Sinjoro, Dio de legiaroj.
Plenas de via gloro la ĉielo kaj la tero.
Hosana en la altoj!
Benata, kiu venas en la nomo de la Sinjoro.
Hosana en la altoj!

Komunia antifono - Mat 28, 20

Jen Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo. Haleluja.

Postkomunia preĝo

Ĉiopova eterna Dio, Vi permesis al ni jam sur la tero gustumi viajn donojn. Veku en ni deziron de la ĉielo, kie kun Vi estas Kristo en la homa korpo. Per Kristo nia Sinjoro.